~ Konsiloj de Profesiulo (1) ~

Taktiko, Baza tekniko 1-'Tranĉi'

La stadio de 'lim-aranĝado' estas, ke post ĉiuj bataloj, restas multigo aŭ malmultigo de teritorioj. Ĉiu el 22 problemoj en tiu ĉi libro estas en la stadio. La stadio komenciĝas ek de 'gravaj lim-aranĝoj'. En la situacio vi devus atenti 'metrajton-tenantajn lim-aranĝojn'.

(1) Ne forgesu viajn 'metrajton-tenantajn lim-aranĝojn'.

(2) Preventu kontraŭulajn 'metrajton-tenantajn lim-aranĝojn'. Tio nomiĝas 'inversa lim-aranĝo'. 'Inversaj lim-aranĝoj' same valoras al la 'metrajton-tenantajn lim-aranĝojn'. 'Inversaj lim-aranĝoj' taksiĝas duoble pli valoraj ol 'ambaŭflanke metrajton-perdantaj lim-aranĝoj'. Tio aperos ofte en tiu ĉi libro. Kompreni la valoron de 'inversaj lim-aranĝoj' estas grave en lernado de 'lim-aranĝado'.

(3) Ŝtonmetu la 'ambaŭflanke metrajton-perdantajn lim-aranĝojn' laŭ la ordo de la valoroj.

En stadio de 'ne-gravaj lim-aranĝoj', vi devus atenti, ĉu ekzistas ŝtonmeto plue gajnanta eĉ nur unu poenton. Tial vi devas ekzerci vin por trovi gajnantajn ŝtonmetojn tuj vidante la figuron de ŝtonaroj. Vi nepre povos utiligi la spertojn vidi diversajn figurojn de 'lim-aranĝo' en tiu ĉi libro, kaj plifortiĝos.


La studadon de 'lim-aranĝado', ne koncernas la larĝeco de la GO-tabulo, 19 vojoj aŭ 15 vojoj. Ĉe la problemoj bonvolu tralegi la ludon ĝis la fino.

En la 'esencaj metoj' en 'lim-aranĝado' ekzistas ĉefe 3 teknikoj; {kaj ofte aperos la 4a tekniko en postaj problemoj.}


1. Tranĉi
2. Internen meti
3. Tuŝmeti

{4. Kojnumi }


Unue montras tipan ekzemplon el 'tranĉi';




Problemo: Nigro havas 'metrajton'.




Diag. 1: Se N1, fariĝas 6 poentoj da blanka teritorio.



Diag. 2:　Teknike estas ‘tranĉi’ per N1. La ŝtono estas kaptita de B2, sed pro la ‘sin-ofero’ Nigro povas plie invadi per ‘tuŝmeti’ N3. {Ĉi tiam Blanko ne povas preterlasi, ĉar se preterlasus, la blanka ŝtonaro estus mortigita.}



Diag.3:　Ĝis B6 la procedo estas devigita. Kiom da poentoj Blanko havas? Inkluzive unu ‘kaptiton’, 4 poentojn. Komparante kun diagramo 1, Blanka teritorio malmultiĝas je 2 poentoj. Grava estas la diferenco en ĉi tia malgranda parto. Tio estas la efiko de la tekniko ‘tranĉi’.